

HORIZON-TAAL

januari - februari 2021

Jaargang 53 - nummer 307

17 CELOJ POR DAŬRIPOVA EVOLUIGO de Unuiĝintaj Nacioj



Aŭskulti Esperanton en pandemiaj tempoj Virtueel Zamenhoffeest: verslag

www.esperanto.be

Met steun van de Vlaamse Gemeenschap

INHOUD

Ten geleide	3
17 celoj por daŭripova evoluigo de UN.....	4
Virtueel Zamenhoffeest.....	5
Aŭskulti Esperanton en pandemiaj tempoj	6
Interview met Language Warriors PH.....	7
Recenzo: Aspiroj.....	9
Unu el la praktikaj aspektoj de konservadbiblioteko.....	11
Artikelen over taal uit de pers.....	13
Mallonge: novaj eldonoj	14
Bestelformulier voor lidmaatschappen	15
Monda arkivejo de la Esperanto-heredaĵo (dua parto)	17
Ni funebras.....	18
Vivo de Zamenhof – ĉapitro 10	19
Krucvortenigmo	23

Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond vzw

53ste jaargang januari-februari 2021. Verschijnt de 1ste van elke oneven maand.

Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd.

Redactie: Piet Glorieux @ horizon.taal@esperanto.be www.esperanto.be/horizontaal

Tekstopmaak: Yves Nevelsteen yves.nevelsteen@gmail.com

Clubactiviteiten: Katja Lödör lodorkatja@skynet.be

Werken mee aan dit nummer: Petro Desmet', Klaas Dijkstra, Jo Haazen, Cyreen Knockaert, Rakoen Maertens, Kris Panis, Paul Peeraerts, Marc Vanden Bempt e.a.

Administratie en verantwoordelijke uitgever

✉ Vlaamse Esperantobond vzw • Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen

☎ 03 234 34 00 @ financo@fel.esperanto.be www.esperanto.be/fel/nl

BE0419 028 122 • RPR Antwerpen • KBC: IBAN BE31 4025 5105 3155, BIC: KREDBEBB

bpost: IBAN BE66 0000 2653 3843, BIC: BPOTBEB1

Abonnement: 30 euro per jaar (6 nummers) **Advertentietarieven:**

	1-malig	3-malig*	6-malig*
1/1 pagina	257	625	1000
1/2 pagina	150	375	600
1/3 pagina	110	275	440
1/4 pagina	80	200	320
1/8 pagina	55	140	220
1/12 pagina	30	75	120

Alle prijzen zijn in euro.

* Inlassing van 3x dezelfde advertentie van een drukklaar geleverd exemplaar. Btw-tarief van 21% op deze tarieven.

TEN GELEIDE

Wat een pracht van een “virtueel” Zamenhoffeest was het, die voorbije twaalfde december. Ongelooflijk hoe nagenoeg elke Belgische club zijn eigen regio in de kijker plaatste en/of zijn artistieke bijdrage leverde. Bij mijn weten is er nog nooit een Zam-festo geweest waarbij de “basis” zozeer aan de basis ;-) lag van het succes. Op naar meer!

En met meer bedoel ik dat het clubleven best meer mag zijn dan “gezellig samenzijn” in ons warme nestje van bekenden. In feite moeten wij onze troefkaarten meer uitspelen, d.w.z. ons netwerk van internationale contacten activeren, effectief gebruiken en ons gebruik in de kijker zetten. Tonen hoe “doodgewone” mensen – niet alleen “intellectuelen” – contact kunnen hebben met “doodgewone” anderstaligen en van elkaar leren. 2021 wacht op ons...

Piet Glorieux

Spreekvaardigheidscursus voor Nederlandstaligen

Cursus voor mensen die een basiscursus Esperanto achter de rug hebben en zich willen vervolmaken. De nadruk ligt op ‘paroligo’ [spreekvaardigheid bevorderen] en het opfrissen van wat je ooit geleerd hebt. De cursus verloopt virtueel, wellicht via Zoom. Als de coronaregels het toelaten kunnen eventueel enkele fysieke bijeenkomsten op een centrale plaats georganiseerd worden.

- Tijdstip: wekelijks op maandag van 19u tot 21u
Start: maandag 8 februari – einde: maandag 28 juni 2021
- Lesgever: Piet Glorieux, info via piet.glorieux@gmail.com
- Inschrijvingsgeld: € 20 (eventuele winst komt ten goede aan Vlaamse Esperantobond)

Nova kurso por estraranoj kaj aktivuloj

Laŭ iniciato de Jean Annet, la nova prezidanto de la valona asocio *Asocio por Esperanto* (APE), ekde 2021 regule okazos interreta kurso por progresantoj per Zoom. La ĉefa celgrupo de la nova kurso estas estraranoj de la diversaj asocioj kaj lokaj kluboj, sed ankaŭ aliaj aktivuloj estas tre bonvenaj. La sola kondiĉo estas, ke oni devas esti membro de unu el la tri belgaj asocioj: FEL, APE aŭ EBG. La kurson gvidos Yves Nevelsteen. Se vi interesiĝas, kontaktu lin per yves@ikso.net

Du flandroj aldonitaj al la Panteono

Al la Panteono de edukado.net, kiun kreis Katalin Kovats por meritplenaj instruistoj de Esperanto, estas ĉi-jare aldonitaj Petro Desmet' kaj Yves Nevelsteen. Vidu www.mallonge.net/panteono

Aŭskulti Esperanton en pandemiaj tempoj

En tiu ĉi malfacila kronviroza periodo, multaj esperantistoj serĉas kontaktojn kaj eblecojn por praktiki Esperanton. Ni ne prisilentu unu el la plej valoraj oficialaj kulturaj kaj praktikaj akiraĵoj: niaj oficiale rekonitaj naciaj kaj aliaj radio-programoj! Vi trovas (preskaŭ) ĉiujn aŭskulteblaĵojn, t.e. radiostaciojn/elsendojn kaj podkastojn, en unu loko en interreto, nome: **esperanto-radio.com/muzaiko** Simple alklaku la butonon “Elsendoj”.

Se vi volas viziti unu el ili rekte, jen kelkaj ligiloj:

- Pola Retradio pola-retradio.org
- Ĉina Radio Internacia esperanto.cri.cn/audio
- Kernpunkto (podkasto) kern.punkto.info
- Radio Esperanto (Kaliningrad, Rusio) radio.esperanto-ondo.ru
- Radio Havano Kubo www.radiohc.cu/eo
- Kanal8610 (Svislando) kanal8610.org
- Radio Vaticana radio-vatikana-esperanto.org
- 3ZZZ en Esperanto (Aŭstralio) esperanto.com.au/3zzz-esperanto-radio
- Studio (legitaj novaĵoj) novajhoj.weebly.com/
- L.J. Santos Morales (podkasto) soundcloud.com/luis-jorge-santos-morales
- Esperanto-Magazino (Francio) toulouse.occeo.net/eo/radio
- Peranto esperantaretradio.blogspot.com
- Radio Frei (Germanio) radio-frei.de (alklaku “podcasts”, “Radio F.R.E.I. Aktuell kaj serĉu per la vorto “Esperanto”)
- Varsovia Vento podkasto.net

Jo Haazen

[Vidu la artikolon en paĝo 6]

17 CELOJ POR DAŬRIPOVA EVOLUIGO DE UN

Kiel esperantistoj, ni havas unikan vidon al la mondo. Tra niaj vastaj interkulturaj spertoj per nia lingvo neŭtrala kaj nia senlima reto de diversnaciaj homoj, ni konscias pri la interligiteco de kulturoj kaj politikaj decidoj. Ni komprenas kiel kio okazas en specifa parto de la mondo povas influi aliajn partojn. Ni scias kiom utilas kunlabori, interkompreniĝi, kaj streĉi niajn mensojn por kompreni la mondon en ĝia tuto, konstatante ke la planedo, la homaro, kaj la diversaj problemoj ne estas sendependaj. Ni kaj nia movado aparte reprezentas tian pli grandan kaj integran vizion.

La kadro de la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE-oj) de la Unuiĝintaj Nacioj (UN) ankaŭ reprezentas tian vizion en eĉ pli vasta skalo. Kiel lingva politiko de unu lando povas influi aliajn, tiel ankaŭ ŝanĝoj en subakva vivo povas influi la sanon de esperantistoj surteraj. La Celoj daŭrigas la laboron komencitan dum la mandato de antaŭa Ĝenerala Sekretario de UN, Kofi Annan (1997-2006), kiu specife emfazis la gravecon vidi la tutan mondon kaj la interligitecon de ĝiaj diversaj domajnoj. Same kiel niaj idealoj kiel esperantistoj, UN volas unuavice altigi la interkompreniĝon kaj kunlaboron al pli bona mondo. Kiel vi vidas, estas nature ke niaj celoj kaj tiuj de UN similas. Ne nur tio: ĝi evidentiĝas fruktodonan grundon por kunlaboro, kaj la CDE-oj formas propedeŭtikan kadron.

Antaŭ la CDE-oj UN havis la Jarmilajn Evoluigajn Celojn (JEC), ok celojn atingendajn inter 2000 kaj 2015. Ili markis la unuan fojon kiam UN havis tegmentan evoluigan celaron al kiu povis rekte kontribui ŝtatoj, entreprenoj, kaj civila socio (movadoj, neregistaraj organizoj). La JEC-oj, kun diversaj sukcesoj, montris la forton kaj praktikan utilon de klaraj kaj mezureblaj celojn. Surbaze de tiu sperto, pli ambicia tagordo estis kreita: Agendo 2030, kiu enkondukis la CDE-ojn. La sukcesa kreado kaj specife la akcepto de la nova kaj ambicia celaro estas tre granda diplomacia atingo kiu montras la forteco de efika multflankismo: ĉiuj 193 membroŝtatoj de UN aprobis ĝin (kompare: la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estis aprobita nur de 48 el la tiamaj 58 membroŝtatoj).

UN antaŭ nelonge publikigis gvidilon en Esperanto! En ĝi vi povas legi, ke la ambicia plano enhavas dek sep celojn. Sed ne nur tion: malantaŭ ili kaŝiĝas

169 subceloj kaj 232 indikiloj. Okazas jara revizio kaj analizo pri la progreso al plenumo de la CDE-oj, kun pinte en julio la Altnivela Politika Forumo pri Daŭripova Evoluigo, en Novjorko. Tie, pluraj landoj prezentas sian progreson al la kompletigo de la Celoj (la tiel nomataj Volontulaj Naciaj Revizioj), kaj surbaze de tio aliaj landoj kaj UN plibonigas siajn proprajn strategiojn. Ĉiu membroŝtato de UN havas komitaton kiu pritraktas la progreson, kaj neregistaraj organizoj aktivas kaj por realigi projektojn kaj por faciligi la kunlaboron. Multaj neregistaraj organizoj ne havis rektan ligon kun la CDE-oj en la komenco, sed poste tamen kontribuas kaj kadrigas sian propran laboron laŭ la CDE-oj.

Ni kiel Esperanto-movado ne rajtas manki en tiu laboro. Ĉu UEA aŭ TEJO, ĉu landa sekcio aŭ faka asocio, ĉu unuopulo aŭ grupo, ni ĉiuj povas kontribui al la monda laboro por plenumo de la CDE-oj. Farante tion, ni malfermas la pordojn al aliaj kunlaborebloj, kun organizoj lokaj, naciaj, kaj internaciaj, kiuj volas kontribui al unu aŭ pluraj el la specifaj celoj. Ni povas kontribui, gvidi eĉ, ĉefe per nia specialismo: niaj spertoj pri interkompreno, kunlaboro, lingva diplomatio, kaj tutmonda vizio. Tiuj estas gravaj lertoj, specife en mondo kiu suferos de dispolusigo. Kiel unuopulo vi eble pensas pri UN kiel fora organizaĵo kiu iel en turo pripensas mondajn strategiojn. La vero, tamen, estas pli interesa. UN estas aktiva kaj influas aktivecojn je ĉiu nivelo: en la turo en Novjorko, sed ankaŭ ĉe la popolo loka. La ideo malantaŭ la CDE-oj estas, ke ili atingi la plej surteran lokan nivelon same kiel la plej altan internacian nivelon. Ke en via vilaĝo aŭ urbo, la ŝanĝoj kaj plibonigoj videblu, sed ankaŭ dum niaj internaciaj kongresoj kaj en interlandaj rilatoj.

Vi povas elŝuti en www.esperantoporun.org la Gvidilon al la 17 celoj por daŭripova evoluigo de UN. Ĝi estas eldonita de Mondial, en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio (UEA). Redaktis ĝin Humphrey Tonkin kaj Rakoen Maertens.

Tuja ligilo al la PDF-dosiero: www.mallonge.net/gvidilo

Mallongigita kaj adaptita teksto de Rakoen Maertens

VIRTUEEL ZAMENHOFFEEST

Op zaterdag 12 december werd het Belgische Zamenhoffeest georganiseerd. Virtueel natuurlijk, om de bekende redenen. Toen een aantal maanden geleden al min of meer duidelijk werd dat een gewoon feest fysiek niet door kon gaan, werd al snel het idee geopperd er een gezamenlijk project van te maken, waarbij iedere club een bijdrage zou gaan leveren aan een digitale versie van het feest in plaats van één organiserende lokale club.

Na een welkomstwoord van Kiki Tytgat, voorzitter van de Belgische Esperanto-Federatie, werden twee nieuwe besturen (dat van Wallonië en dat van Vlaanderen) gepresenteerd. Daarna volgde een gevarieerd programma van circa drie uur: de steden/regio's van enkele lokale clubs (Kalmthout, Gent, Kortrijk, Limburg, Brussel) werden getoond in de vorm van foto- of video-impresies. Zelfs een heuse virtuele wandeling kwam voorbij. Daarnaast waren er literaire bijdragen (vertaalde van Guido Gezelle en een origineel van Johan Van Eenoo) en enkele persoonlijke voorstellingen en een presentatie van het Internacia Esperanto-Arkivo, een archief van duizenden boeken en tijdschriften opgebouwd in België. Het wordt binnenkort verhuisd naar Slovakije, om daar verder onderhouden te worden met de juiste mankracht.

Na een impressie van Belfast, de stad waar in 2021 (hopelijk) het Esperanto-Wereldcongres wordt georganiseerd, was er veel muziek te genieten: talenten uit de lokale clubs zelf werden aangevuld met opnamen van de vele concerten die de Antwerpse club La Verda Stelo vorig en dit jaar – fysiek én virtueel – verzorgde.

Het was La Verda Stelo die gastheer was, waarbij ikzelf als technisch 'producent' optrad. In een Zoom-omgeving is dat wel wennen, want een aantal bijdragen werd pas op het laatste moment aangeboden en volgordes van programmaonderdelen moesten op het laatste moment nog veranderd worden; toch een belangrijk verschil met 'normale' feesten, waar het programma toch enigszins vaststaat. Alhoewel het het Belgische Zamenhoffeest betrof en er gewoonlijk al enige buitenlandse bezoekers zijn, was dit jaar extra internationaal. Net zoals bij reguliere Zamenhoffeesten bleef men ook hier na afloop 'hangen', waarbij men bij de computer zijn/haar eigen consumpties nuttigde.

Een fysieke bijeenkomst heeft bij mij de voorkeur, alhoewel er nu niet opgeruimd moest worden! Maar



gezien de omstandigheden mag dit evenement met 73 bezoekers toch een succes genoemd worden.

*Klaas Dijkstra
Meer foto's zijn te vinden op <https://t.me/s/fotokanalo>*

AŬSKULTI ESPERANTON EN PANDEMIAJ TEMPOJ

Prof. Jo Haazen antaŭ nelonge lanĉis alvokon al plia diskonigo de la ekzisto de Esperanto-radiostacioj. Ni volonte publikigas eltiraĵojn el lia pledo, direktita al la redakcioj de Esperanto-revuoj...

En tiu ĉi malfacila periodo multaj esperantistoj serĉas kontaktojn kaj eblecojn por praktiki Esperanton. Mi speciale pensas pri junuloj kaj novuloj, sed ankaŭ pri pliaĝuloj kiuj ŝatus iel aŭdi kaj aŭskulti sian karan lingvon.

Kiel vi scias, aŭskultado de interesaj kaj edifaj radio-programoj ege helpas komencantojn kaj progresantojn disvolvi kaj perfektigi sian lingvokonon. Aŭskultado de radio-elsendoj estas tre bona helpilo por ligi samideanojn inter si, por plifortigi la tutan Esperantomovadon kaj por perfektigi la lingvokonon de ĝiaj membroj. Ĉiaj radio-programoj, oficialaj kaj privataj, montras kaj pravas la rekonon de nia lingvo fare de oficialaj kaj neoficialaj instancoj. Jen nesubtaksebla ero de la propagando por la universala lingvo.

Bedaŭrinde mi rimarkis ke *preskaŭ ĉiuj Esperanto-jurnaloj kaj -revuoj neglektas tiujn ĉi faktojn* kaj tiele nek helpas la progreson de la movado, nek individuajn esperantistojn kiuj serĉas eblecon por pli bone kompreni kaj paroli la Zamenhofan lingvon. Jen grava strategia eraro!

Iuj redaktoroj asertis al mi ke ne eblas regule sciigi al la legantaro la retajn elsendojn kaj ondolongojn de radiostacioj. Mi ne konsentas, opiniante ke ĉio eblas se oni vere komprenas la utilon kaj la valoron de tiu ĉi ideo havanta, kadre de la praktika Esperantovivo, pedagogian, propagandan kaj eĉ prioritatan karakteron.

Mi memoras ke en la pasinta jarcento pluraj Esperantogazetoj [inter kiuj la revuo “Esperanto” de UEA] regule diskonigis detalojn pri niaj radio-elsendoj. Kial oni forlasis tiun tradicion? Ĉu la hodiaŭaj redaktoroj neniam pripensis la avantaĝojn de Esperantlingvaj radio-programoj, la tutmondan, *senpagan reklamon por nia lingvo kaj la kuraĝigajn rezultojn ĉe la aŭskultantoj, speciale junuloj kaj novuloj?*

Tial mi petas denove kaj insistas: ne plu neglektu niajn Esperantlingvaj radio-elsendojn en viaj revuoj sed denove publikigu ilin serve al la tuta esperantistaro!

Krome, se ni ne subtenas la Esperanto-redakciojn ili riskas malaperi se iliaj redaktoroj kaj skipoj ne ricevas sufiĉe da reagoj fare de la aŭskultantaro... Tio en la pasinteco jam tro ofte okazis je Radio Hilversumo (NL); Radio Romo (IT); Radio Bilbao (HIS); Radio Budapesto (HUN); Radio Vienna (AŬ); Radio Varsovio (POL); Radio Berno (SV); Radio Barcelono (HIS); Radio Zagreb (JUG)...

Ĉu ni estas nekomprenemaj, stultaj aŭ miopaj? Kial subpremi niajn proprajn akiritaĵojn kaj avantaĝojn? Ĉu kelkaj opinias tiamaniere kontribui al la progreso de nia movado?

Resumo kaj propono:

- Realigu en kadreto, per klara logo, kelkcentimetran koncizan superrigardon de niaj Esperantlingvaj radio-programoj.
- Publikigu tiun rubrikon en ĉiuj gazetoj kaj revuoj, ĉiun fojon, en ĉiuj aperantaj numeroj, ekzakte kiel faras ĉiutagaj naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj en la tuta mondo.

Aŭ ĉu nia movado havas sufiĉe da membroj por permesi al si prisilenti unu el la plej valoraj oficialaj kulturaj kaj praktikaj akiraĵoj: niaj oficiale rekonitaj naciaj kaj aliaj radio-programoj? Bv. do trovi spacon de kelkaj centimetroj en viaj revuoj por ke la abonantoj kaj interesatoj povu ekscii per kiuj retadreso kaj ondolongoj ili povu aŭskulti tutmondajn kaj Esperanto-novaĵojn.

Mi ripetas: En tiu ĉi malfacila [kronviroza] periodo multaj esperantistoj serĉas kontaktojn kaj eblecojn por praktiki Esperanton. Helpante ilin vi helpas ankaŭ la tutan movadon!

Mi konscias pri tio ke iuj kanaloj ne estas aŭdeblaj en kelkaj landoj, sed tio ne povas esti argumento por bremsi la publikigon de radio-programoj ĝenerale. Esperantistoj ja troviĝas en multaj landoj, ne nur tie kie ne eblas aŭskulti Esperanton per la radio aŭ per la reto.

Por helpi vin, mi serĉis je la reto necesajn donitaĵojn pri Radio Havano, Pekino, Vatikano, Rio de Janeiro, Varsovio, Kaliningrado kaj pri aro da aliaj valoraj elsendoj. [Vidu la liston en paĝo 3]

INTERVIEW MET LANGUAGE WARRIORS PH, VERTALERSNETWERK IN DE FILIPIJNEN

Na een succesrijke campagne via sociale media vorig jaar waarmee de online taalkundige diversiteit in Azië werd gevierd, wordt het samenwerkingsproject in 2020 voortgezet. Elke week is er een nieuwe taalactivist/pleitbezorger die de Twitteraccount @Asia-LangsOnline beheert. Hij/zij kan op die manier zijn/haar ervaringen, “beste praktijken” en “geleerde lessen” delen i.v.m. het doen heropbloeien en vooruithelpen van zijn/haar moedertaal, met speciale aandacht voor de rol van internet. Deze campagne gebeurt in samenwerking met Rising Voices [In het Esperanto: Tutmondaj Voĉoj], Digital Empowerment Foundation en O Foundation.

Elke week zal de gastheer enkele vragen beantwoorden over zijn achtergrond en zijn taal kort voorstellen. Dit interview met Kristina Gallegos (@mksgallego), die het vertalersnetwerk Language Warriors PH vertegenwoordigt, geeft aan de hand van Vragen en Antwoorden een vooruitblik op wat de groep zal bespreken tijdens de week dat zij de account zullen beheren.

Tutmondaj Voĉoj (TV): Vertel ons iets over Language Warriors PH.

Language Warriors PH (LWP): Language Warriors PH is een online initiatief van het departement Linguïstiek van de Universiteit van de Filipijnen in de stad Diliman. Bedoeling is om gemeenschapsvertalers en taalactivisten of enthousiastelingen in de Filipijnen samen te brengen die bezig zijn met het vertalen van materialen over de COVID-19-pandemie naar verschillende Filipijnse talen.

TV: Wat is op heden de status van de talen waarmee jullie werken, online en fysiek?

LWP: De leden van Language Warriors PH hebben een verschillende taalachtergrond. De Filipijnse talen die de LWP-leden gebruiken, krijgen verschillende vitaliteitsbeoordelingen. Volgens de tabel EGIDS van de website Ethnologue varieert de vitaliteit tussen “nationaal” (Filipijs), “ruim verspreid” (Bikol, Cebu, Hiligajnon, Ilok, Masbate, Pangasin, Tausug, Varaj), “onderwezen” (Aklan, Chabakan, Kinar, Surigau), “in evolutie” (Cujon, Onhan, Magindan), “vitaal” (Capizn, Ivat), en “bedreigd” (Ibat). Veel



*In een pandemie is onwetendheid dood
en desinformatie moord*

talen die in de groep vertegenwoordigd zijn hebben online gemeenschappen die sprekers samenbrengen en als platformen functioneren om informatie te verspreiden, zoals publiek materiaal over COVID-19.

TV: Op welke thema's willen jullie focussen?

LWP: Op de eerste plaats zullen we het hebben over taaldiversiteit in de Filipijnen, vooral over de vitaliteit van de meer dan 180 talen. Daarnaast zal het werk van de Language Warriors PH aan bod komen, voornamelijk over de verzameling van de materialen over COVID-19 aangemaakt door lokale gemeenschappen in de Filipijnen, tijdens de eerste maanden van de quarantaine die van maart tot mei 2020 in de Filipijnen van kracht was. Wij zullen een overzicht geven van de ontwikkelingen in het vertaalwerk tijdens die periode, voornamelijk welke informatie vertaald werd (gezondheid, geestelijke gezondheid, socio-economische ondersteuning enzovoort), in welke van van de hierboven geciteerde talen vertaald werd, wie de vertaling op zich heeft genomen (vrijwilligers-vertalers, professionele vertalers, regering), en ten slotte, hoe de gebruikers van de diverse talen de vertaalde materialen hebben verspreid, benaderd en aangewend. Wij voorzien ook

een voorstelling van de specifieke vertalersgroepen en initiatieven, de toekomstplannen en perspectieven van Language Warriors PH, en ten slotte zullen we enkele projecten en initiatieven van het departement Linguïstiek van de Universiteit van de Filipijnen voorstellen.

TV: Wat zijn de voornaamste motieven voor het digitaal activisme van Language Warriors PH? Waarop hopen jullie en wat zijn jullie dromen voor de talen die jullie groep promoot?

LWP: Language Warriors PH startte vanuit de behoefte om belangrijke informatie over de openbare gezondheid met betrekking tot COVID-19 te verspreiden in de talen die de bevolking gebruikt en begrijpt. Veel materiaal aangemaakt door de nationale en lokale besturen bestaat alleen maar in het Engels of het Filipijns, dus de informatie is niet toegankelijk voor mensen die die talen niet beheersen.

Om daar verandering in te brengen, begonnen gemeenschapsvertalers die materialen te vertalen naar

hun eigen taal, vooral tijdens de eerste maand van de quarantaine. Language Warriors PH functioneerde als communicatieforum tussen vertalers onderling dat zorgt voor het delen van de gemaakte materialen en beschikbare middelen, het meehelpen bij de aanmaak van de materialen en het bijhouden van algemene tendensen in de aangemaakte materialen.

Op basis van de bevindingen en de aangemaakte materialen van de Language Warriors PH zullen aanbevelingen worden opgesteld die moeten helpen bij het verbeteren van regeringsrichtlijnen inzake verspreiding van belangrijke informatie in de talen die Filipijnen gebruiken en begrijpen. Wij hopen ook dat, na de COVID-19-pandemie, Language Warriors PH zal blijven functioneren als platform voor samenwerkingsprojecten tussen lokale gemeenschappen, voor de promotie en het revitaliseren van inheemse talen in de Filipijnen.

*Uit Tutmondaj Voĉoj, 26 juli 2020
(vertaling: Piet Glorieux)*

Esperanto is (bijna) gelijkwaardig aan andere talen in Global Voices

Global Voices (Eo: Tutmondaj Voĉoj) is een internationaal netwerk van bloggers, vertalers en burgerjournalisten. Zij volgen, rapporteren en maken samenvattingen van wat op internet gebeurt en vormen daarmee een alternatieve bron van informatie.

Esperanto is een van de tientallen andere talen waarin artikelen verschijnen, op gelijke voet met de andere talen. Maar het is niet mogelijk om een artikel in het Esperanto voor te leggen aan het journalistenteam dat bepaalt of een bijdrage in aanmerking komt voor publicatie.



Bekendmaking van het bestaan van deze bron van informatie is nodig om het bezoekersaantal te doen stijgen. Global Voices is onderdeel van het project Lingua. Er loopt een samenwerkingspartnerschap met TEJO, de Esperanto-jongerenorganisatie. Lees er meer over in het Wikipedia-artikel over het project LINGUA.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Projekto_Lingua

Help mee om het bezoekersaantal van Tutmondaj Voĉoj te verhogen!

Bezoekersaantallen zijn belangrijk, net zoals voor YouTube. Surf daarom regelmatig naar de website of, nog beter, abonneer je op de nieuwsbrief via de website eo.globalvoices.org (klik op "Novaĵletero", rechts bovenaan). Natuurlijk bestaat de site ook in een Nederlandse versie.

Manuela Burghlea heeft op het IJK 2019 in het Tsjechische Liptovský Hrádok een voordracht gehouden over Tutmondaj Voĉoj. Deze is opgenomen en je kunt ze integraal terugvinden op YouTube.

www.mallonge.net/tutmondaj

NOVAJ DETEKTIVAJ ASPIROJ


En nia verda mondeto, ĝenerale tiuj, kiuj emas verki, havas du elekteblojn: aŭ ili ĉion forlasas je la, kelkfoje kapablaj, manoj de siaj eldonistoj, kiuj ŝvitegas por disvendado de iliaj verkoj, kaj tiamaniere verkistoj fariĝas kabinetuloj, homoj kiuj enŝlosas sin en sia privata mondo, kaj nur sporade, dum Esperanto-eventoj, apenaŭ kontaktas siajn legantojn; aŭ, ili mem fariĝas eldonistoj kaj, tiel, vojaĝas ĉien, kun valizoj plenplenaj de libroj, kaj pro tio fariĝas propagandistoj, vendistoj, ktp., kiuj, dum siaj preskaŭ neekzistantaj liberaj horoj, eĉ ion propramane verkas!

Tamen, estas inter tiu manpleno da homoj tiuj, kiuj kapablas trovi ekvilibran padon kaj, eĉ se kun kelkaj malfacilaĵoj, sukcesas mastri kaj la kreivan kaj la komercan flankojn de la mondo de la libroj. Unu el tiuj, raraj eĉ for de Esperantujo, estas Lode Van de Velde: profesie fotografiisto, li scias kombini tiun arton kun tiu de administrado de propra eldonejo, simptome nomata *Libera*, kaj, krom tio, verkas, kvankam mallongajn, interesajn librojn pri fotografiarto, poezio, vegana kuirarto, ktp, ĉar diversaj estas liaj interesoj, kiuj ja igas lin multvizaĝa aŭtoro.

Tamen, ĉi-foje Van de Velde prezentas al ni sian (almenaŭ ĝis nun) solenaskitan romanon: *Aspiroj*, kiun li mem prezentas kiel *kroniko de neanoncita murdo*. Kaj jen ni alvenas al la momento kiam la kara leganto ekpensas: *Neeee, ĉu plian?* Jes, certe, pro diversaj kialoj, tiu specifa literatura ĝenro enmodas ĉe ni; tamen, ĉi-kaze, mi povas aserti al vi, ke Van de Velde aldonis novan ingrediencon, eble veganan, al la jam tradicia formulo.

Aspiroj estas romano kiu, jam dekomence, surprizas nin pro sia longeco, ĉar ne estas kutime, eĉ por nacilingvaj verkoj, ke detektivaj romanoj havas 241 paĝojn, nek tiom longa listo da roluloj: 28 da ili estas listigitaj en la paĝo 7. Tiu vere helpema kaj didaktika listo estas interesa rimedo por tiutipaj romanoj, sed malofte uzitaj ĉe ni ĉar, kutime, niaj ĉi-stilaj verkoj ne tiom da roluloj prezentas. Sed *Aspiroj* tute ne estas kutima detektiva romano, kaj ni vidu kial.

Tiuj, kiuj kutime legas murdromanojn scias, ke estas du tipaj komencoj por tiuj verkoj: aŭ ili elmontras la krimon (sen riveli la krimulon), aŭ ili preferas fiksi la atenton sur la momento kiam oni eltrovas la kadavron (kiuj sekvas usonajn televidseriojn, kiel *Law and*



Order, jam konstatis ke, plejofte tiu momento estas la plej noviga ene de la skemo de murdnoveloj). Bone, Van de Velde prezentas novigon en tio, ĉar kvankam li priskribas la du scenojn, li sufiĉe kaptas nian atenton kaj pri la krimo kaj pri la eltrovo. Ekde tiam, la aŭtoro ja manprenas nian atenton dumaniere: ĉu per la rakontado mem, ene de kiu la eblaj suspektatoj multobliĝas, kaj ni neniel povas diveni aŭ dedukti kiu finfine murdis la viktimon, ĉu per la paralelaj vojoj de ĉiu rolulo.

Tiu dua rakontado, konstruita laŭ kvazaŭskeĉa elfluo, estas unu el la plej gravaj kaj interesvekaj punktoj de *Aspiroj*, ĉar per ĝi oni povas analizi kiel ĉiu rolulo reagis al la krimo, kiel ĝi transformas iliajn personajn rilatojn, kaj, fine, oni ja ekpovas skizi la psikologiajn trajtojn de la roluloj, provante, kvazaŭ ni mem estus la detektivoj, trovi la krimulon. Tiamaniere, ne estas la esplorado pri la murdo kiu vere gravas en la libro, sed la tuta psikologia fono de la romano, kiu donas al ĉiu rolulo kaj okazintaĵo privatajn kaj specifajn nuancojn, kaj portas la leganton ene de la ludo. Tamen, pri kiu ludo temas?

La vera detektiva ludo starigita de Lode Van de Velde komenciĝas ne per la murdo, sed en la momento kiam li deturnas la leganton, kaj igas lin ne nur (aŭ ne plu) esplori kiu mortigis Martin Krause, sed ankaŭ la grandan amason da informoj pri la Esperanto-kulturo, kiuj, duonkaŝe, estas en la rakontado. Al la leganto, je ĉiu paĝo, la elsarkado de tiuj informoj starigas duoblan detektivan ludon: oni devas kaj solvi la krimon kaj eltrovi la referencojn.

Kaj ili abundas: de la menciitaj adresoj: Marvirinstrato (p. 206), Trompeterstrato (p. 207), mencioj pri gravaj (kaj vere veraj) Esperanto-aŭtoroj, kiel Peter Peneter, al ŝercludoj kun aliaj (vere falsaj) referencoj, ekzemple iu certa *Okamaĉ*, kies *Ekstermoj* reprezentas la Siberian Skolon. Ankaŭ abundas, en kelkaj dialogoj, preskaŭ nepercepteblaj uzitaj, citaĵoj kaj titoloj de vere famaj verkoj de niaj pasintaj aŭtoroj. Mi lasos al la leganto interpreti kio finfine estus *piĉismo* kaj *istvanaj* kalemburoj. Tamen, mi aŭdacas kredi, pro la respektemo laŭ kiu ili estas menciitaj (p. 192), ke Van de Velde vere omaĝis al Sten Johansson kaj Ronald Cecil Gates, el kiuj li certe ricevis iom da influo. Sed ne nur pri la Esperanto-kulturo oni trovas menciojn, ankaŭ pri Esperanto-rilataj verkoj estas en la teksto: bona ekzemplo estas *Mirinda Kapitano* (tio estas, *Captain Fantastic*, filmo kie nia lingvo menciatas).

Krom la mencioj al la Esperanto-kulturo, la libro alportas, al ĝenerala, sed preferinde ne-plu-novbakita leganto, iom da prilingvaj demandoj: jen estas lingvistika diskuto pri akcenta silabo en kunmetitaj vortoj (p. 154), kaj jen normala, tamen ŝoka por kelkaj legantoj, ĉeesto de *na* kaj *ri*, kiujn Van de Velde nek poras, nek kontraŭas, nur simple uzas, laŭ siaj privataj stilaj bezonoj. Trej interesa estas ankaŭ la slangaj, sed samtempe kaloĉajaj, dialogoj kiuj testas nian kapablon interpreti Esperanto-tekston sen la finaĵoj. Same interesa estas kreado de frazoj kiaj *Ne sedu!* (p. 235) por ke oni ne senkulpigu sin.

Sed ne nur tiam finiĝas la prilingvaj demandoj: por malesperigi la bonlingvistojn, estas en la libro diversaj, kvankam pivaj, nekutimaj vortoj: kaj oni ja devas traserĉi la vortaron, kio kontribuas almenaŭ al pligrandigo de nia vortprovizo (mi mem neniam estis aŭdinta pri la verbo *stamfi*, ekzemple). Tamen, ĉar vivo de lingvo ne apartenas al vortaro, estas en la teksto kelkaj nepivaĵoj kiel, ekzemple *kondoloj*, anstataŭ *kondolencoj*; ie oni same trovas *elektran ŝnuron*, kial ne simpla *drato*? Kaj tre interesaj novaj esprimoj, eble kreitaj de la aŭtoro mem, kiel *poteo*, mallongigo de *portebla telefono*. Fakte kun nur unu el la lingvaj novigoj de Van de Velde mi ne povas akordi:

en la paĝo 183, li uzas la esprimon *retren* kun la senco *retroen*; ĉar tiu fina *o* ne estas o-finaĵo. Sed, iel ajn, *retro* jam estas prepozicio kiu jam indikas movon.

Tamen, la persona sinteno de la aŭtoro rilate al lingvo-uzo estas bonega signo de la plena esplorado, far la aŭtoro, kaj de Esperanto, kaj de lia propra stilo, kio, en tempoj kiam oni plendas pri pasteŭrizado de la beletrarto, estas ĉiam bonvena. Ĝuste pro tio oni jam devas saluti la kuraĝon de Lode Van de Velde verki tekston kiel *Aspiroj*, kies tre neatendita konkludo estas jam kaj surprizo por la leganto, kaj hoko por estonta daŭrigo.

Fine, ĉar temas pri detektiva romano, mi finos tiun recenzon invitante la legonton mem detektivi la libron celante malkovri, en ĝi, kial ĝia titolo estas ĝuste *Aspiroj*. Kial?

Fernando Pita

Lode Van de Velde: Aspiroj – kroniko de ne anoncita murdo. Eldonejo Libera, Antverpeno, 242 paĝoj. Libro glubindita. ISBN 978-0-244-26435-2.

Noto de la redakcio: En la romano Aspiroj aperas multaj kulturaj referencoj kaj diversaj vortludoj. Superrigardon de ili, la aŭtoro publikigis en Vikipedio. Konsultu la liston dum la legado, se vi iam legus la verkon! <https://eo.wikipedia.org/wiki/Aspiroj>

Ĉu vi jam konas la retbutikon de Flandra Esperanto-Ligo? En ĝi vi povas agrable promeni laŭ la libroj, diskoj, kasedoj, komputilaĵoj, filatelaĵoj, ktp. Vi povas ankaŭ krei listojn laŭ via prefero, ekzemple liston de difinita aŭtoro. Vi povas rigardi la kovrilpaĝon de viaj preferataj libroj, aŭdi pecon el viaj preferataj diskoj, legi recenzon pri ili aŭ venigi pliajn detalojn.

Por havi superrigardon pri la novaĵoj, elektu la eron novaj produktoj en la pendomenio Kategorio. En tiu sama pendomenio vi povas ricevi superrigardon de la bazaj literaturaj verkoj, t.e. la libroj kiuj laŭ William Auld aperu nepre en ĉies biblioteko.

Kompreneble vi povas ankaŭ mendi la varojn. Por mendi, simple metu nombron en la kolumno *Kvanto* kaj post la butikumado metu ĉion en vian butikumĉareton.

Agrablan viziton!

www.retbutiko.be

UNU EL LA PRAKTIKAJ ASPEKTOJ DE KONSERVADBIBLIOTEKO


Mi pensas ke malmultaj personoj scias kiamaniere Heredajbiblioteko Hendrik Conscience (Erfgoedbibliotheek HC, EHC), kaj verŝajne aliaj konservadbibliotekoj, estas aparte lerte organizitaj por praktike malebligi estontan forigon de iu ajn dokumento aŭ de iu ajn subkolekto, nek sekrete, nek oficiale. Jen.

Katalogistoj plenumas la registradon kaj enhavo-priskribon de novaj objektoj (libroj kaj alispecaj publikigaĵoj, eĉ sole ciferecaj).

La plej facila, sed eble plej grava tasketo de katalogisto estas la asigno kaj la enskribo de la inventarnumero. Tia numero aspektas kiel ekzemple: 854 039, kaj ĝi estas liverata per la komputilprogramo. Ĝi estas skribata en la dokumenton (vidu bildon 1) se temas pri materiala objekto, kaj ĝi restos la sola sed neeviteble alportenda “librodifekto”, krom la poste alportenda diskreta (seninka) relief-stampo. La inventarnumero estas simpla sinsekva unika numero el longa neniam interrompita serio. Ĝi identigas publikigaĵon kaj estas do speco de *rijksregisternummer*. **Oni ne rajtas ŝanĝi ĝin aŭ reutiligi ĝin por alia dokumento. Ĉiu publikigaĵo ekde 1, 2, 3, ... ĝis la lasta katalogaĵo ĉiam ĉeestu en la biblioteko kaj restu trovebla.** Inventarnumero povas rilati ankaŭ ciferecan publikigaĵon; sammaniere oni ne rajtas forigi, ŝanĝi aŭ reutiligi ĝin por alia publikigaĵo, kvankam la objekto ne bezonas spacon.

Plurvolumaj aŭ plurobjektaj (ekzemple libro kun kasedoj) dokumentoj kompreneble restu ĉiam fizike kunaj, kaj tial la objektoj obtenas la saman inventarnumeron kun kroma(j) cifero(j), ekzemple 836 543:1 kaj 836 543:2. Periodaĵoj esence estas konsiderataj kaj pritraktataj kiel aliaj plurvolumaj dokumentoj sed ĉar ili havas tute apartan karakteron, la koncernaj katalogado kaj stokado estas prizorgataj de specialigitaj kunlaborantoj. Jen ekzemple la inventarnumeroj de *Monato*: 260 680, de *Horizontaal*: 232 030, kaj de *Esperanta Numismatiko* (cifereca revuo): 830 322.

La lasta tasketo de la katalogisto koncernas la t.n. mendadon de la publikigaĵo, eĉ se temas pri donaco jam akirita. Dum tiu ĉi fazo, al ĉiu materiala objekto, strekkodo estas atribuata. Plurvoluma aŭ



plurobjekta publikigaĵo do estas karakterizata de unu sola inventarnumero, sed de pluraj strekkodoj. Kompreneble, neniu strekkodo estas bezonata por nure ciferecaj publikigaĵoj aŭ por ĉiu numero de papera gazeto.

Antaŭ la estiĝo de la komputilo, la inventarnumeroj estis mane enskribataj tagon post tago en klasikajn dikajn inventarlibrojn (nederlande, en EHC: *stamboeken*), kiuj ankoraŭ ekzistas kaj kelkafoje estas konsultataj. Pri ĉiu nova akiraĵo oni notis la daton de la eniro, kaj la originon de la objekto (ekzemple: donaco de...). Kompreneble neniu estis rajtigita ŝanĝi titolojn aŭ trastreki inventarnumerojn.

La enkonduko de la komputilo ŝanĝigis tiun malmodan tradicion metodon, sed nur teĥnike, ne enhave.

Nuntempe, certan momenton, kiam la sama katalogisto registras sian duan libron, ties ĉi inventarnumero eble estos 854 040, aŭ unu pli ol por la unua libro, se la kolegoj intertempe ne estis aktivaj. Sed lia/ŝia dua numero ankaŭ povus esti 854 050...



Aliaj kunlaborantoj okupas sin pri diferencaj aliaj taskoj ĝis la alveno de ĉiu publikigaĵo, en ties “definitivan” stokadlokon. Ekzemple: la monografioj ricevas relief-stampon kaj senacidan blankan kovrilon (vidu bildon 2). Laŭdimensie ili estas apartigataj, ne laŭenhave, nek laŭsubkolekte. La bildo 2 do ne estas fotita en la “definitiva” stokadloko! Ĝi celas nur montri la aspekton de la libroj.

En tiu “definitiva” ejo, publikigaĵo numero 1 ne necese troviĝas flanke de numero 2, nek numero 854 040 flanke de 854 041. Nenie estas ĉambro aŭ salono aŭ ŝranko aŭ ujo kun respektive la libroj pri historio, pri sociologio, pri ... Esperanto... Ĉiuj libroj en tia biblioteko estas anonimaj en siaj blankaj kovriloj. Ili estas samrajtaj... Helpe de la strekkodo sur la kovrilo (vidu bildon 2) de ĉiu objekto kaj la komputilprogramo oni povas determini ĉiujn donitaĵojn, kaj pri la enhavopriskribo kaj pri la stokadloko.

La dimensioj de la dokumento estas la normo por la fizika klasado. Danke al la mirindaj eblecoj de la informadiko, malgraŭ la “mallogika” stokadmaniero, neniel la eroj estas netroveblaj, kontraŭe! La ANET-katalogo provizas per multaj serĉadmanieroj, utiligante aŭ unu simpla kriterio, aŭ lerta kombinaĵo de pluraj kriterioj. Miaopinio, la ANET-serĉilo estas unu el la plej adekvataj bibliotek-serĉiloj en la mondo. Ne mirinde, skipo de pli ol dek ege specialigitaj profesiuloj de Universitato Antverpeno, daŭre kaj seninterrompe prizorgas kaj disvolviĝas la sistemon kiu rilatas ne nur la katalogadon, sed ankaŭ la postan mastrumadon de la akiraĵaro. Ni estu fieraj pri tiu tute flandra realigo, la komuna bibliotek-katalogo de du universitatoj kaj de dudeko da sciencaj institutoj el la provincoj Antverpeno kaj Limburgo!

Konsiderante la registrad- kaj la stokadmanieroj

en EHC, estas tre malfacile kaj praktike neeble, nerimarkite forigi libron el la biblioteko. Supozu iu metus alian samdimensian libron por anstataŭigi la originan, kaj tiu persono falsus la inventarnumeron. Li ankaŭ devus falsi la enkatalogon priskribon. Kaj la agoj kaj la identeco de ĉiu katalogisto ĉiam estas komputile registritaj. Nur la konataj kaj registritaj katalogistoj povas kaj rajtas fari ŝanĝojn en la katalogon. Ili ne povas interveni sen postlasi siajn identecojn. La falsisto estus rapide trovita! **Same, “oficiala” forigo de libroj, des malpli eliminado de tuta subkolekto, estas praktike neeblaj, ĉar ili estus ekstreme malfacilaj kaj temporabaj operacioj.**

La sola ebla kaj permesita forigo de dokumento el EHC (nur por eldonaĵoj de post 1830) estas anstataŭigo per pli bona kopio. Ankaŭ tiukaze specialaj procedoj estas plenumendaj. Pli malpli difektitaj (intertempe anstataŭigitaj) libroj regule estas simbolapreze vendataj al la publiko.

Tiu elementa baza organizo de EHC, koncize priskribita, estas simpla, logika kaj efika. Sed eble la koncernaj libraristoj, evidente motivitaj kaj konservemaj personoj, speciale konceptis ĝin por provizi per kroma, maksimuma protekto de la bibliotek-kolektoj kontraŭ la arbitreco de ĉiuj estontaj administrantoj kaj leĝdonantoj? Vivu do la konservad-libraristoj! Ili estas pli lertaj ol la politikistoj...

Tiele pluraj Esperanto-libroj, ĉeestantaj en EHC ekde la komenco de la dudeka jarcento, danke al la instigo de kelkaj antverpenaj Esperanto-pioniroj, tie jam troviĝas dum 110 da jaroj. Certe maloftaĵo en Flandrujo kaj alie.

La biblioteka organizo esence celas la senesceptan konservadon de la tuta akiraĵaro. Kompreneble, tia sistemo ne povus funkcii sen samsevera procedo de akcepto. Tiu ĉi estas bazita sur **la laŭleĝa kolektosfero de la konservadbiblioteko**, kiu estas samatempe ties ekzistokialo kaj jura mandato. Ekzemple la *Albertina* (aŭ Reĝa Biblioteko de Belgujo) deponigas ĉiujn verkojn eldonitajn en la lando, aŭ publikigitajn de belgaj aŭtoroj vivantaj eksterlande, do ankaŭ la tiajn esperantlingvajn.

La laŭleĝa tasko de EHC estas kolekti kaj konservi publikigaĵojn interalie pri la nederlanda literaturo, pri la historio de Flandrujo, pri “la flandro”, kaj pri Antverpeno. Nepe ĉiuj publikigaĵoj pri Antverpeno, aŭ eldonitaj en Antverpeno, estas kolektendaj kaj konservendaj. Tiu tasko tamen estas pli ampleksa ol ŝajne, ĉar ankaŭ kompletaj kolektoj eventuale povas esti akceptataj kaj konservataj, kondiĉe ke tia kolekto **kiel tutaĵo** estu konforma al unu aŭ pli el la bazaj kriterioj.

Ekzemple, subkolekto rilate al iu flandra verkisto ankaŭ povas inkluzivi kuirlibrojn, vojaĝgvidilojn, ... kiuj ebligas ion scii pri la vivo kaj la personeco de la aŭtoro... Post ĉio, la scienca esploristo devas disponi laŭeble plej multajn elementojn por fundamenti sian studon. Analoĝe, la akcepto de la “Kolekto de Flandra Esperanto-Ligo” ne estis arbitraciaĵo aŭ persona prefero de iuj oficistoj. Flandra Esperanto-Ligo situas en Antverpeno kaj tie okazas la precipaj aktivecoj de la asocio. La flandraregiona Esperanto-movado estas elemento el la historio de Flandrujo (kaj ne malofte de Antverpeno). Por pristudi kaj kompreni tiun specialan subspecion de flandro, la esperantisto, la scienca esploristo bezonas aliron al la pensadmondo de tiu “bizarulo”. Ĉu ekzistus por tiu celo pli bona fonto ol la diverseco de esperantaj kaj priesperantaj publikigaĵoj, eĉ se multaj el tiuj ĉi provenas de aliaj landoj kaj mondpartoj? Oni ne forgesu: EHC estas studbiblioteko, scienca biblioteko. Tial ekzemple ĝi sisteme kolektas kaj konservas eĉ specimenojn el la kutimaj senpagaj reklamogazetoj (bildo 3). Efektive, estontece oni bezonos la plej aŭtentikajn fontojn pri la nutraĵo, la vivmaniero, la opinioj kaj interesoj de la flandraj antaŭuloj ...



Pri publikigaĵoj, EHC iom similas la “Infero”-n de Dante. La enirantoj ne eniras sen tre bona kialo. Sed la enirintoj neniam estos elirantoj. Dante ankaŭ priskribis la “Paradizo”-n. Ĉu ĉi tiu ĉapitro de la “Dia Komedio” estus pli taŭga kiel kompara resumo? *Omnis comparatio claudicat.*

Cyreen Knockaert

LINGVO

ARTIKELN OVER TAAL UIT DE PERS

Duitsland wil af van spelalfabet met enkel “Germaanse namen” uit de nazitijd

De Duitse deelstaat Baden-Württemberg wil dat het hele land komaf maakt met het spelalfabet dat in 1934 werd ingevoerd door het naziregime. Toen werden alle verwijzingen naar Joodse namen vervangen door meer Germaans klinkende termen. De Joodse organisaties in Duitsland zijn tevreden over het resultaat, maar een federale instelling moet nog wel de goedkeuring geven. www.mallonge.net/327

Frans parlamentslid prijst Aya Nakamura in strijd tegen accentdiscriminatie

Het Franse parlement debatteerde deze week over accentdiscriminatie. Het gaat daarbij om bijvoorbeeld het verschijnsel dat sollicitanten met hoorbare accenten uit bepaalde regio's minder of helemaal geen kans maken te worden aangenomen. De LREM, de partij van president Emanuel Macron, stelt voor een wettelijk verbod op die vorm van discriminatie in te voeren. www.mallonge.net/318

Liefst geen Kelly of Britney? “Dan sturen we iemand anders”, zeggen 9 op de 10 uitzendkantoren Krijgen Kelly en Britney minder kansen dan Anne en Sarah? Uit een experiment in het VTM-programma ‘Ze zeggen dat’ blijkt van wel. Negen op de tien uitzendbureaus gingen probleemloos in op de vraag om geen kandidaten met een naam eindigend op een -y te sturen naar een event met stijlvolle hostessen. “Zulke namen zijn toch volks, hé”, klonk het bij een van hen. www.mallonge.net/314

Speculoos: is dat erfgoed?

30 oktober 2020: er gaat een schokgolf door Belgisch Twitterland als Lotus aankondigt dat het de naam speculoos vanaf volgend jaar inruilt voor het internationaal gebruikte Biscoff, een samensmelting van ‘biscuit’ en ‘coffee’. De verontwaardiging is groot: veel mensen noemen het een aanslag op hun culturele erfgoed en kondigen alvast aan dat ze nooit biscoff zouden kopen. www.mallonge.net/313

Meer artikelen kan je vinden op www.benelukso.eu

MALLONGE: NOVAJ ELDONOJ

UNESKO ELDONIS UNUAN LIBRON EN ESPERANTO

